# voko el stirio

Bulteno de la Esperanto-movado en Stirio kaj de la Esperanto-Societo „Unueco“ Graz

Mitteilungsblatt der Esperanto-Bewegung der Steiermark und des Esperanto-Vereins „Einigkeit“ Graz

Eksterordinara **N-ro 380** **3-a de januaro 2025** ZVR44747381603


# Raporto de Ewald Schick

*Miaj Esperanto-renkontiĝoj komenciĝis la 10-an de decembro kiam mi vizitis kun Raia Androvska ŝian Esperanto-klubon en **Cardiff**. Kun granda ĝojjo oni bonvenigis min en Ilia rondo. Tie mi ĝuis veran kristnaskan feston kion mi bone memoras.*

*Oni sentis Esperanto-etoson, sed bedaŭrinde jam la 11-an de decembro mi devis forlasi tiun ĉi belan landon Kimrio!*



*Atendis min ankoraŭ du renkontiĝoj:*

*Post du-jara paŭzo okazis en Vieno en la Pola Instituto denove la **Zamenhof-festo** la 14-an de decembro. La tago komenciĝis je la 13:30 ĉe la Zamenhof-monumento en Girardi-parko apud lla fama baroka preĝejo de Sankta Karlo. Kun granda plezuro mi konstatis ke multaj Esperantistoj el diversaj landoj partoprenis. Permesu mencii ke venis kvin personoj sub gvido de mia amiko Petro Grebecel el Izola (Slovenio), du personoj el Brno, kie okazos la venonta UK! Ĉeestis ankaŭ Miroslav Malovec kaj Milan Kolka, el Kimrio s-ino Raia Androvska. Post la renkontiĝo ĉe la Zamenhof-monumento ni ĉiuj iris al Pola Instituto kie nin atendis mia tre kara amiko prezidanto Alfred Heiligenbrunner kun liaj klubanoj. Imagu, ke partoprenis 29 personoj kaj kelkaj per skajpo. Post bonvenigaj salutoj de Alfred Heiligen-brunner komenciĝis la festo.*

*Prelegis Bernhard Tuider kaj Franz-Joseph Geidel. Poste ni kunsidis kaj babilante ni ĝuis nian Esperantan komunumon. Permesu al mi esprimi mian dankon al ĉiuj partoprenantoj de tiu sukcesplena festo. Tial mia granda deziro estas ankaŭ en 2025 aranĝi Zamenhof-feston en Vieno kun helpo de Vienaj Esperantistoj. Fine de nia Zamenhof-festo ni ĉiuj vizitis la kristnaskan merkaton antaŭ la urbodomo.*

*La 19-an de decembro Raia mia honora gasto kaj mi vizitis **Munkenon**. Mi kore dankas pro invito al la estro de la Munkena E-Klubo s-ro Uli Ender kaj liajn klubanojn.*




*Ankaŭ tie nin atendis bona atmosfero en bonege rondo. Kristnaska tempo ankaŭ alportis multajn sentojn. Partoprenis Raia Androvska el Kimrio, Ewald Schick el*

*Aŭstrio kaj Marian el Gliwice (Pollando).pretigis belan programon. Tial mi ankaŭ deziras venontjare partopreni la feston.*





*Ni bondeziris al vi kaj viaj karaj familianoj benatan kristnaskon kaj stelaplenan novan jaron 2025…..!*
*Amike Ewald*



*„La New York de la estonteco“, profeta karikaturo de Thomas Nast jam farita en la jaro* ***1881***.







# * *Impressum* *

Mitteilungsblatt des Grazer Esperanto-Vereines Esperanto-Societo Stirio „UNUECO“
Für den Inhalt verantwortlich:
Dr. Heinz-Paul Kovacic
Panoramagasse 3, 8010, Graz
Tel. 0664 3264027
heinz-paul.kovacic@aon.at